# ESPERANTO SUB
# *LA SUDA KRUCO*




Numero 14 [1995/2] — Marto-Aprilo 1995

**Organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj**

ISSN 1039-9380

# ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj
Redaktoro: Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304, Aŭstralio.
☎ kaj faksoj: 096 46 1389. (Faksoj eblas nur post tujantaŭa averto per telefono, ĉar la telefono kaj faksmodemo uzas komunan lineon.) Elektronika poŝto: don@enkidu.dialix.oz.au
Correspondence Courses: John Moore, 7 Pelican St, Emu Park Qld 4702.
Libroservo:Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036, Aŭstralio.

## EN ĈI TIU NUMERO

Analoj de 1994 (Diplodoko) ..... 2
Lingva angulo (Alan Towdey) ..... 6
Pri mia restado en Aŭstralio (Franciska Toubale) ..... 10
Raporto el Arnhem-Lando (Trevor Steele) ..... 11
Anonco pri Forum ..... 12
Somerlernejo 1995 ..... 13
Nekrologo: Vlado Kosef ..... 20
Deziras korespondi ..... 20
Zamenhof-festa parolado 1994 (Martin Purdy) ..... 21
Libro-anonco ..... 23
Skribas la legantoj ..... 24
Diversaĵoj ..... 25

Libroj:
Aventuroj en Esperantujo ..... 17
Being Colloquial in Esperanto ..... 17
Aforismoj kaj Tekstoj ..... 19

### Se vi deziras legi pri io, verku artikolon!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: "Ni vere bezonas artikolon pri...?" Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Vi povas sendi vian kontribuon sur komputila disko (Macintosh aŭ MS-DOS—nur 3½-cola) aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, bonvolu atenti: la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas. Se vi deziras resendon de disko aŭ manuskripto bonvolu kunsendi taŭgan afrankitan adresitan koverton.

Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas redakti kaj korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo, kaj konformigi ĝin al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temas pri io kronologie urĝa. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro. La publikigo de artikolo ne indikas ke ĝi reprezentas la vidpunkton de la Aŭstralia aŭ Nov-Zelanda Esperanto-Asocio.

Limdato por artikoloj por la maja numero: 22 aprilo

# ANALOJ DE 1994
## de Diplodoko

La jaro 1994 estis rimarkinda pro kelkaj antaŭenpaŝoj de la tutmonda civilizacio. La Konvencio de UN pri la Juro de la Maro ekvalidis. La nova registaro en Kampeŝio (Ĥimerio) daŭre funkciadis, spite al la klopodoj de la Ruĝaj Ĥimeroj. Estis paca balotado en Unuiĝinta Ĝermio.

Tamen estis ankaŭ jaro kun multaj seksaj kaj skandalaj eventoj kaj problemoj.

En la Meza Regno de Ceramikio, la Sekretario, Dungi Ŝaŭman Pinpongon, indikis, ke lia registaro deziras partopreni en la tergloba socio—fariĝi fondanta membro de la Tutmonda Komunerca Organizaĵo (TUKO). Sed Aglolando rifuzis akcepti la membriĝon de Ceramikio ĝis ĉiuj homaj rajtoj estas respektataj en tiu lando. Specife oni asertis, ke la Regno nepre devas agnoski kaj protekti la rajton de ĉiu persono fondi familion; ke geedza paro rajtas naski pli ol unu bebon; ke oni ne devas, post la naskiĝo de la unua bebo, konstanti gluti pilolojn aŭ suferi fortranĉon de ŝatata parto de sia korpo.

Sekretario Dungi proponis, kiel kom-promeson, ke ceramikianoj, kiuj naskiĝis alilande, ekzemple en Vetamio, konservu sian rajton naski senlime bebojn. Sed tio ne kontentigis la aglolandanojn, kaj Ceramikio restis ekster la elito de TUKO je la fino de la jaro.

Tamen estis en Ceramikio iom da espero pri la estonteco. Oni preparis sin por celebrado de la ĝojiga tago kiam la insula bruta kolonio de Hontigkonto revenos al la Patrinujo. Oni fabrikis en alta loko gigantan horloĝon kiu tiktakadas kaj indikas kiom da sekundoj restas ĝis la jaro 1997, tiu gravega momento en tutmonda historio kiam okazos Universala Kongreso en Kangurulando, kaj oni povos forflugi el nova flugkuirejo en Hontigkonto al la nova trankvila flugkuirejo de Sidejo.

En Aglolando ankaŭ estis perturbo pri la rajtoj de la familio. La Prezidenton oni konstante kritikis per akuzoj, ke lia edzino, Hilumlilio, fakte portas la prezidentan pantalonon, kaj ke li mem en antaŭaj jaroj dediĉis multajn horojn al la ĉasturmentado de sekretariinoj. Sed en Aglolando oni ne deziris limigi la naskadon—tute ne—tre forta organizaĵo, konsistanta el homoj kiuj mem naskiĝis dufoje aŭ denove, insistis, ke oni ne uzu artefaritan amparoladon, nek malkoncipmetodojn, nek abortklinejojn. Ili organizis demonstraciojn antaŭ tiuj konstruaĵoj kaj sugestis, ke nepre necesas havi amikon de fetoj ne amfetominojn en la Blanka Domo. Estis malfacila situacio por Prezidento, kiu ege deziris la subtenon de voĉdonantoj kaj devis paroli respekteme kaj klintone pri la rajto vivi kaj la pekego aborti. El tiu profunda politika dilemo leviĝis solvo—ke se la Prezidento subtenos la rajton de la familio—tio estas la rajto naski multajn infanojn—la evangeliistaj kongresanoj ne persistos pri projekto de leĝo por starigi la rajtojn de ĉastaj, t.e. ĉasataj feministoj.

En Aglolando estis ankaŭ en 1994 granda plifortiĝo de respublikismoj kiuj tre ŝatas la elefanton. Eble dank' al la Verduloj tiu besto ne nur pluvivis sed eĉ plimultiĝis. Kiam oni kontrolis, en novembro, evidentiĝis, ke estas nun pli da elefantoj ol azenoj. La demokratoj, aŭ demagogoj, tute malsukcesis en sia kampanjo elimini la elefantojn kaj enŝovi pli da azenoj en la domon de amikoj de la Prezidento.

Sed la Vatekrana Ŝtato subtenis la militantojn kontraŭ la klinikoj. Lia Pepa Moŝto eldonis furoran Libron de la Jaro, kiu vaste vendiĝis kaj kiu laŭdegis multinfanajn familiojn. Ĝi tute kontraŭis ĉiun limigon de konceptoj, ĉu per medikamentoj ĉu per kaŭĉukaj anasoj. Pli bone ke oni restu analfabeta pri seksa edukado ol ke oni aĉetuKontakton.

En la suda parto de la Nigra Kontinento oni celebris per balotado la reunuiĝon de la lando per akcepto de la principo de egalaj rajtoj de blankuloj, nigruloj kaj ruĝuloj.

En Anĝelio (parto de la Bruta Insularo) estis ankaŭ skandaloj. Ŝajne granda proporcio de la deputitoj en la Parlamento, inter ili kelkaj ministoj, preferis foriri el sia oficejo por daŭrigi siajn ŝatatajn endomajn sportojn. La flavaj tablojdoj, kiuj devas gluti politikisto, ne estis agrablaj, ĉar la ĵurnalistoj asertis, ke la metodoj uzitaj de la parlamentaj sportistoj ne estis ĉiam kriketo.

La Ĉefministo, majoreto de la kabineta muzikaro, por regajni la subtenon de la popolamaso, organizis kelkajn eksterlandajn ekskursojn.

Li sendis la Anĝelreĝinon al Ursolando, kie ŝi konversaciis en krinolino kun la ŝtatestro, Prezidento Ĝelatsino. Ŝi ankaŭ vizitis artgalerion en la urbo denove nomita pro la unua Pepulo, Sankta Petro, t.e. Rokulo. Ŝi salutis la novan, plidensigitan federacion, kaj esprimis bedaŭrojn, ke ŝia avo ne povis akcepti viziton de la ŝtatestro de Ursolando, kiam estis tempestoj kaj ruĝaj tajdoj antaŭ kelkaj jaroj.

La ĉefminista moŝto sendis la kronprincon al Kangurulando, kie la civitanoj, spite al la respublikistoj de tiu lando, tamen diris "Bontagon Amiko", kaj kie oni ne konstante postulis pli da detaloj pri la amparolado de la reĝa familio. Estis unu eventeto, kiam entuziasmulo pri la rajtoj de la ĥimeraj boatistoj deziris per pistolo starti remkonkurson sur la podio. Sed ĝenerale la vizito estis sukceso.

Per tia aktivado la anĝelia ĉefministo evitis la neceson konsili al la reĝino, ke ŝi organizu balotadon. Ŝi ankaŭ estis feliĉa, ĉar ŝi jam devis akcepti turistojn en la Palaco de Kalcitrantaŝinko kaj transdoni la enspezojn al la Impostaj Moŝtoj.

Kelkaj kangurulandanoj, kvankam ili ĝuis la reĝidan viziton, tamen ne ĉesis paroli pri la ebla starigo de respubliko, pri kio oni legis en libro de Platono, tradukita de lerta kaj perta Esperantisto, D-ro Larĝripo. Platono inventis sistemon de amoro, en kiu oni uzas la langon nur por konversacio. Li ankaŭ laŭdis la meritojn de respubliko en kiu la riĉaj kleruloj kaj kleraj riĉuloj regas super la malsuperaj klasoj. Strange la reganta partio en Kangurulando, kiu pretendis reprezenti la laborantojn (tio estas la proletaron) celis starigi platonan sistemon—de regado—antaŭ la komenco de la 21-a jarcento.

Sed plejparte la kangurulandanoj preferis debati pri la sportoj—la kriketo (testa aŭ unutaga), la teniso (sur natura aŭ artefarita gazono), aŭ la futbalo (rugbia, sokrata aŭ laŭ aŭstraliaj reguloj). La registaro hezitis organizi referendumon ĉar la filozofio de ozuloj ne estas platona aŭ sokrata sed: "Se maŝino funkcias ne ĝin riparu".

La ĉefministo de Kangurulando, S-ro Kitino, preferis vojaĝi, ekzemple al Amnezio, kie oni bankedas en elegantaj butikaj ĉemizoj kaj prokrastigas agprogramojn al la jaro 2012. Li ankaŭ devis komenti pri la memuaroj de sia antaŭulo Roberto Akcipitro.


La Ministo pri Eksterlandaj Aferoj, Garola Evangeliisto, eklaboregis por instali sin en la Ĉambron de Reprezentantoj, aŭ en la Altan Kortumon, aŭ kiel Sekretarion de Unuiĝintaj Nacioj. Li rivelis, ke Kangurulando aspiras fariĝi, post du jaroj, membro de la Sekureca Konsilo. Li ankaŭ anoncis, por fari amikojn kaj influi homojn, ke Kangurulando apartenas al najbara norda kontinento, kies landoj havas multajn voĉojn en la balotado de UN.

Pri la Ĉefo de la Opozicio estis la kutima disputado. La veterano Andreo Pavo tute retiriĝis el la Parlamento. Johano Huŝsono estis elektita kiel nova ĉefo sed post malvenko en balotado li devis cedi la torĉon al Aleksandro Lanugulo.

La landojn norde de Kangurulando ankaŭ celas la Esperanto-Movado, kiu okazigis sian tielnomitan Universalan Kongreson en Korolando, la unuan fojon en tiu ŝtato. Spite al la morto de la ŝtatestro de najbara ŝtato, Kim Ono, la kongresanoj multe ĝuis la kunvenojn kaj la spektaklojn. Nur poste evidentiĝis, ke estis riskoj en vizito al la senarmeigita zono, kaj ke ne ĉiu ponto trans la sola rivero estis eterna. Ĝojege partoprenis multaj Esperantistoj el Nepotismio kaj Ceramikio, el Vetamio, el Ĥimerio kaj eĉ el Sinkoporo.

Plej ĝojega evento de la jaro por la Esperantistoj en la Kongreso el Kangurulando estis la decido de la Universala Esperanto-Amikaro akcepti la inviton okazigi la Kongreson de 1997 en la ĉefurbo de Sud-Kangurulando. Pri la evoluo de tiu projekto oni devos atendi la analojn de 1995 kaj 1996. ❑

---



Desegnis Igorj Sitnikov



# LINGVA ANGULO



de Alan Towsey

## RIGHT AND WRONG

Patricia Harkin skribis al mi:

"Mia plej lasta problemo estas la angla right/wrong. Traserĉante mian vortaron mi legis la jenajn:
right: ĝusta. korekta, prava, justa, rajto, rekte, dekstra.
wrong: malĝusta, malprava, maljusta, erara, misa, malbono.
Hodiaŭ mi legis en lernolibro: 'He is wrong—li eraris.' Kial ne 'Li malpravas', eĉ "li estas malĝusta"?"

Nu, ni provu klarigi la problemon.

**ĝusta** = correct; appropriate for the occasion.

Tiu esprimo estas ĝusta.
Vi ne tenas la ilon ĝuste/en la ĝusta maniero.
Tiu estas la ĝusta ilo por la tasko.
Li montris al mi la ĝustan vojon al la urbo.

Evitu **korekta**—ĝi devenas de la verbo **korekti**, do efektive signifas "corrective", kiel en "korekta domo" (establejo, kie oni provas korekti kaj plibonigi junajn deliktulojn) (*PIV* p.567).

**justa** = just, fair.
**rajto** = a right.
**dekstra** = right hand.
**rekte** = straight (to something); ĝi estas adverbo, = senpere (without intermediary).

**prava** = devenas de rusa правый *pravij*, kiun mia rusa vortaro difinas angle jene: "right-hand; just; innocent; right", kaj donas ekzemplon por ĉi lasta: вы правы *vi pravi*—you are right". Tiu ĉi estas la signifo de **prava** en Esperanto. Laŭ la "Universala Vortaro" de Zamenhof en *Fundamento de Esperanto*[1], ĝi signifas france "qui a raison, qui est dans le vrai", kaj angle "right (to be in the right)".

---

[1]*Fundamento de Esperanto* estis libro akceptita de la Unua Universala Kongreso de Esperanto en 1905 kiel la oficiala prezento de la lingvo Esperanto. "Universala vortaro" estis parto de la libro. Sekvis multaj represoj. En 1991 nova eldono redaktita de D-ro André Albault, prezidanto de la Akademio de Esperanto eldoniĝis. Ĉi tiu eldono de 1991 en ĉi tiu artikolo nomiĝas la "Akademia" eldono.—Red.

Laŭ *PIV* **prava** =

1. havanta opinion konforman al la vero. (Do: Vi estas prava.)
2. (opinio) konforma al la vero. (Do: pro la pravaj motivoj—for the right reasons.)

Denove laŭ *PIV* **erari** =

1. deflankiĝi de la ĝusta vojo, perdi la ĝustan vojon. (Do: erari en arbaro; = vojerari, erarvagi.)
2. deflankiĝi de la vero, de la ĝusta opinio, kalkulo, kaj simile. (Do: = make a mistake, err.)
   Ne, vi eraras, sinjoro.ẑ (You are mistaken, you are making a mistake)
   Dio ĝuste faras, neniam eraras.ẑ
   Nur tiu ne eraras (makes a mistake), kiu neniam ion faras.ẑ
3. deflankiĝi de la morala devo. La Erarinta Filo (The Prodigal Son).
   La signifo de la **mal**-vortoj estas evidenta. Por "a wrong" mi tradukus **maljustaĵo**.

**Misa** aludas al ago, kiu ne plene sukcesis. *PIV* donas ekzemplon: unu misa ĵeto de lanco (= la lanco maltrafis). Laŭ *PIV*, **mis-** aldonita al verbo indikas, ke la ago estas nekonvene, erare aŭ malĝuste farata.

Oni povus do eble diri, ke "Vi eraras" signifas, ke oni malĝuste faras, kalkulas, komprenas ktp. ion, dum "Vi malpravas" signifas, ke tio, kion oni diras, ne estas vera. Sed ofte ne estas ia grava aŭ atentinda diferenco inter la du, kaj kelkfoje ambaŭ taŭgas por iu situacio.

## MORE

Dudley Parkinson skribas:

"Mi vidis en numero 12 de *Esperanto sub la Suda Kruco* la frazon "Estas pli, sed mi ne fuŝu vian plezuron". Eble ĝi estas tajperaro. Mi skribus "Estas plu...". Ĉi vi volus klarigi pri "pli" kaj "plu"?"

Laŭ la "Universala Vortaro", **pli** signifas "more / [france] plus ["Akademia" aldono: (*comparatif de supériorité*)] [germane] mehr".

Ĝi indikas komparon kun io esprimita aŭ subkomprenata. Do:

Tiu libro estas pli granda, ol tiu ĉi.

Jen kelkaj ekzemploj el *PIV*, kun tie kaj tie komentoj de mi:

Du homoj povas pli multe fari, ol unu.ẑ
El du malbonoj, pli malgrandan elektu.ẑ
Iru pli rapide.ẑ
Li ne povos vivi pli ol unu tagon.ẑ
Ne estas permesite al mi pli diri.ẑ (ol mi jam diris).
Ni konsilas pli uzadi ĉiam formojn simplajn anstataŭ kunmetitaj.ẑ
Mieno lia montris pli suferon, sed ne koleron.ẑ (= ol koleron: suffering rather than anger).

Pli oni nenion sciis el lia historio.ᶻ (= nenion pli ol mi jam rakontis).
Restas ĉirkaŭ dek personoj, ne pli.ᶻ
Observu pli da ordo.ᶻ
Pli da bruo, ol da faro.ᶻ (Mi neniam vidis nek aŭdis "**plu** da...").
**pli kaj pli**: esprimas "konstantan progreson de la ago":
Li senlace iris pli kaj pli profunden en la arbaro.ᶻ
pli aŭ malpli/pli-malpli = more or less.
pli aŭ malpli frue (sooner or later).
pli kaj pli granda/ĉiam pli granda (bigger and bigger).

Laŭ la "Universala Vortaro", tamen, **plu** signifas [france] "de plus ['Akademia' korekto: plus (*duré*), de plus, davantage] / [angle] farther, further / [germane] weiter, ferner."

Ĝi do indikas daŭrigon (extension) (de stato aŭ ago) en tempo aŭ spaco. Laŭ *PIV*, ĝi "montras la daŭradon kaj neĉeson de stato aŭ ago". Jen kelkaj el ties ekzemploj (kun tie kaj tie miaj komentoj):

*1. En la tempo (= pli longtempe):*
Ŝi volis diri ion plu, sed ŝi ne povis.ᶻ
Ho, diru, kion plu vi scias.ᶻ (= what more you know).
Dangere estus lin lasi plu en tia libereco.ᶻ
kaj tiel plu (and so on).

*2. En la spaco (= pli malproksime):*
Iru ankoraŭ unu paŝon plu! (= one step further).
Se vi legus plu, vi vidus, ke la fino estas pli klara. (If you read on.)

*PIV* rimarkigas: "Kun nea vorto, **plu** signifas la maldaŭron, la ĉesigon de ago aŭ stato":
Mi ne povas iri unu paŝon plu.
Ne parolu plu (don't say any more).
ĝis tie kaj ne plu (thus far and no farther).
Mi neniam plu vidis ŝin (I never saw her again).
Oni ne plu uzas tiun esprimon. (That expression is no longer used).
Ne batu min plu! (Don't hit me any more!)
Formorti, dormi kaj nenio plu.ᶻ
neniaj duboj plu (no further doubts).

Do la frazo "Estas pli sed mi ne fuŝu vian plezuron" estas tute ĝusta (= Restas pli ol mi jam rakontis, sed...).

Jen kelkaj derivaĵoj el *PIV*:
**plia:** estanta pli; aldona (additional).
Unu plia mortis. (Oni povus diri ankaŭ: Unu pli [ol jam mortis] [nun] mortis.)
Jen plian komplezon mi petas de vi.ᶻ (one more favour).

**plie:** krom tio
Unu paro da manoj plie ne montriĝis superflua.[z]
Eĉ plie mi povas diri.[z] (Oni povus diri ankaŭ: Eĉ pli...)
Li donis al ŝi veston kaj plie monon.

**plua:** daŭranta plu, okazanta en posta tempo:
Nun rakontu al mi pluan sorton de ili.[z]
Li restos tri pluajn tagojn (= tri tagojn plu—three days longer).
Pluaj mendoj kostos pli (ol la nuna prezo) (Further orders after this...)
ĝis plua informiĝo (until further information is received).

**plue:**
Mi plue silentos pri tio (I'll say no more about it).
Kaj ankaŭ plue ŝi naskis filon.[z]
De tiu tago kaj plue (from that day on) Saul malamike rigardis Davidon. (el Malnova Testamento)
Kiam la bela muziko ludis ĉiam plue, ŝi ne povis plu elteni.[z]
Plue kaj plue sonis la kantado. (The singing went on and on).

**Pluen:**
La kompatinda knabino trenadis sin pluen.[z]
Abram iris pluen, ĉiam pluen al sudo. (el Malnova Testamento)
Li iris ĉiam pluen kaj pluen.[z] (He went on and on).

Butler (*Step by Step in Esperanto*, §582) komparas:
"Mi ne trinkis pli (multe) ol vi"
kun
"Mi ne plu trinkis (= mi ĉesis trinki".
Li daŭrigas: "**Plie, plue,** moreover. (**Plie** = in addition, to a greater degree; **plue** = furthermore, in continuation), kaj rimarkigas: "The difference is slight, and often either word is applicable."

**ŜATI again!**

It seems this word simply will not go away! In *Oomoto* (from Japan), No.436/1994, inside back cover, I found: "Ni tre ŝatas la ligojn kaj fratajn rilatojn inter Oomoto kaj Blanka Frataro."

Now, does **ŝati** here mean "prize, have high regard for, appreciate", or "like"?! I think it's about time, in the interests of clarity, that the *Akademio* gave us a ruling on this word, don't you?

---

# *MAZI ESTAS SEKURA*

La vidbenda kurso *Mazi en Gondolando* ja kompletiĝos, espereble antaŭ la UK ĉijara. Laŭ anonco en *Eventoj* 2/januaro, jam alvenis la 1090a antaŭmendo.—Partoprenantoj en nia Somerlernejo ĝuis la unuan lecionon de Mazi kaj ankaŭ specialajn kantojn por *Mazi* verkitajn de Alan Bishop.

# PRI MIA RESTADO EN AŬSTRALIO

## de Franciska Toubale

Antaŭ mia reveno al Francio, mi deziras saluti pere de tiu revuo la Esperantistojn, kiujn mi ne renkontis dum mia kvin-monata restado ĉi tie. Mi petas pardonon al la konsilintoj, kiu deziris sendi min al Perto, Adelajdo, Uluru, Kakadu, Sidnejo ktp. Mi komprenas ke ili fieras pri la beleco de sia lando...kontinento...kaj ŝatas partigi tiun senton kun fremdlandanoj sed mi ne kuraĝis gluti tiel multe da kilometroj. Fakte mi volonte lasis malantaŭ mi la premon de mia vivo en Francio kaj lernis novan vivritmon, novan paŝon kun la lokaj verduloj ekzemple. Okaze de promenado, en ĉia vetero (ĉiuj scias kiel ŝanĝebla estas la Melburna vetero) ĉiuj plantoj, ĉiuj floroj, eĉ la plej modesta, indas observadon kaj paroladon pri ĝi. La celo certe ne estas fanfaroni pri la nombro da kilometroj da promenado.

Iom post iom mi kapablis distingi la odoron de *eucalyptus radiata* aŭ *pittosporum*, la krion de kantturdo aŭ vipobirdo (*psophodes olivaceus*). Mi eksciis ke por vidi ekidnon (*tachyglossus*), vi nur bezonas stari senmove, forgesante pri la tempo kiam ĝi gratas la teron. Por rekompenci vian paciencon ĝi levas sian muzelon plurfoje en diversaj direktoj, atendas ankoraŭ iomete kaj finfine malrapidas al alia formikotruo. Dancante, kantante kun la folklora grupo de Viktorio en la parko de belegaj domegoj, kiuj apartenas nun al *National Trust*, mi ekvidis la Aŭstralian spiriton. Mi eĉ povis daŭrigi mian praktikadon de Aikido, laŭtradicie tio estas senmalprave eniri batalon, konkuradon.

Plaĉis al mi la amika, trankvila etoso de la marda renkontiĝo kun la Esperantistoj de la Centro por la edukado de plenkreskuloj en Melburno. Ĉiuj interesate sekvis la raporton de Harry pri la kreskado de liaj tomatoj. Kia ĝojo kiam li anoncis ke li venkis: ili maturiĝis antaŭ Kristnasko! Preskaŭ ĉiam Ruth alportis al ni ion, aŭ libreton pri Aŭstralio, aŭ ĵurnalon, aŭ respondon al miaj demandoj. Mi ankaŭ ŝatis la Zamenhofan feston, preparitan de Jenny, laŭ mi pro la malstreĉita etoso kaj la diverseco de ĝia enhavo.

Kvankam mi ne sentas min kiel militantinon kaj ne deziras puŝi iun ajn en la lernadon de Esperanto, mi ĝojis propagandi la universalan lingvon, parolante kun Bernie en kia ajn loko. Ni ofte kaŭzis la saman surprizon kiel en Francio: "Ĉu ankoraŭ ekzistas?" ekkriis multaj el la aŭskultantoj. La plejparto opinias ke Esperanto estas bona ideo. Mi ne promesas ke ili tuj lernos ĝin. Sed almenaŭ ili ne kontraŭstaros.

Nun mi devas daŭrigi mian vojon, lasi miajn novajn amikojn por retrovi la malnovajn kaj familion. Mi esperas ke la projekto "Ekparoli" plene sukcesos kaj ke, se mi revenos en Aŭstralion, mi trovos pli grandan Esperantistaron. ❑

# RAPORTO EL ARNHEM-LANDO

de Trevor Steele

Antaŭ dek ok monatoj miaj ideoj pri la situacio de la aŭstraliaj aborigenoj estis relative klaraj. Sed miaj spertoj kaj observoj tre ŝancelis tiun klarecon.

Mi eĉ dubas, ĉu iu ajn diro pravas rilate al ĉiuj aborigenoj. La homoj, kun kiuj mi parte konatiĝis (ĉu iam eksterulo ĝisfunde elkonus ilin, estas dubinde) vivas en kaj ĉirkaŭ Maningrida. Tiuj ĉi Arnhem-landanoj neniam perdis sian teron, kaj ilia situacio tre diferencas de tiu de la senteraj aborigenoj vidataj en aŭstraliaj urboj. Eĉ se ĉiupaŝe urbaj nigruloj ricevas la "mesaĝon", ke ili estas iel malsuperaj en fremda ĉirkaŭaĵo, la nigruloj de Arnhem-lando, parolante siajn multajn proprajn lingvojn, sentas sin neniel malsuperaj.

Sed ne eblas ĝeneraligi eĉ pri Arnhem-landanoj. Tion klarigu historia skizeto pri la regiono plej bone konata al mi. Maningrida estas marborda vilaĝo fondita en la 1950-aj jaroj kiel haveneto, kien oni liveras per pramo manĝaĵojn al malsatantoj de tiu ĉi regiono (laŭ cinika onidiro, por malhelpi, ke ili amase migru al Darvino, nur 400km okcidente). Unu rezulto estis malamikeco inter la tradiciaj loĝantoj (Ndjebenoj) kaj diversaj eksnomadaj grupoj, kiuj ekloĝis en Maningrida; alia estis konfuziĝo de la klana vivo, drinkado kaj kverelado. En la fruaj 70-aj jaroj komenciĝis la "outstation"-movado; la registaro helpis grupetojn starigi miniaturajn vilaĝojn sur tradicia tereno for de Maningrida, "outstations". La vivo ĉe tiuj vilaĝetoj, kie alkoholo estas malpermesita kaj la malnovaj tradicioj estas parte konservataj, tre diferencas de tiu en Maningrida. Sed ne antaŭvideblas, ĉu la "outstations" daŭros, ĉar la tieaj junuloj, spertinte la diskotekojn kaj futbalmaĉojn de la "metropolo", ofte montras mankon de entuziasmo pri la tradicia vivstilo.

Krome la diversaj "outstation"-grupoj varias inter si laŭ temperamento (laŭdire, ekzemple, la Burraroj pli emas lerni de blankuloj ol la Guningoj), geografio—kaj eĉ samklanaj vilaĝetoj varias inter si pro diversaj karakteroj de individuaj homoj. Aldonu, ke estas preskaŭ konstanta moviĝo de grupoj inter Maningrida kaj la "outstations", kaj inter la diversaj "outstations"—kaj ke geedziĝoj kutime ligas eĉ diverslingvajn "outstations".

Mallonge, ĉia ajn ĝeneraligo eĉ pri la homoj de tiu ĉi relative malgranda ekstremnorda terstrio estas riska. Sed unu el la kutimaj taskoj de raportanto estas serĉi validajn ĝeneraligojn pri temo, kiun la legantoj ne povas mem sperti.

Mi ne povas promesi klarajn respondojn, sed inter la ĉefaj demandoj de posta raporto estos:

Ĉu entute eblas vera komunikado inter la indiĝenoj kaj ni, tio estas, la neindiĝenaj Aŭstralianoj?

Ĉu ni scias, kion ni celas en Arnhem-Lando (kaj aliloke)?

Se ni scias, ĉu niaj celoj estas bonaj?
Ĉu niaj metodoj povus esti pli efikaj?
Ĉu nia ĉeestado bone efikas sur la indiĝenoj?
Ĉu estus pli bone, se ni simple retirus nin kaj lasus la indiĝenojn decidi la propran sorton? ❑

---


# FORUM

ETNIKÁ A PRÍRODA
ETHNOSES AND NATURE
ETNOJ KAJ NATURO

**POPRAD-TATRY (SLOVAKIO) 26.6-5.7 1995**

Agantoj de la scienco kaj kulturo, ĉiuj kiuj konscias pri neceso *konservi bonkvaliton kaj diversecon de la kultura kaj natura vivmedio de la homaro*, estas invitataj partopreni en la Forumoj "Etnoj kaj Naturo" (ETNA) por analizi etno-naturajn interrilatojn vidpunkte de la scienco, arto kaj edukado.

La unua Forumo, ETNA '95, reflektos rilatojn inter la eŭropaj etnoj kaj medio de la modera naturzono kaj okazos en Slovakio, en Altaj Tatroj dum 26.06-05.07.1995. La dua, ETNA '97 analizos tiujn interrilatojn en subtropikoj kaj tropikoj de Aŭstralio kaj Oceanio. ETNA '99 aŭ 2001 pasos en ekvatora zono de Sud-Smeriko. Rezulto de la Forumoj estos *Antologio* de la spiritaj, sociaj, ekologiaj aspektoj kaj de la praktika sperto de la etno-naturaj interrilatoj en la diversaj naturzonoj de la mondo.



*1995: Eŭropa Natur-protekta Jaro*

Praktika celo estas helpe de la diversetnaj kunlabrantoj analizi kaj diskonigi sperton de la harmoniaj etno-naturaj interrilatoj. Tiucele estas kreata *Internacia Lernejo de la Ekologia Vivmaniero*, kiu en la unua Forumo prezentos la sperton de la eŭropaj etnoj. Tio estos kontribuo al la *Eŭropa Naturprotekta Jaro 1995.*

Se esperantistoj partoprenos multnombre en ETNA-Forumoj Esperanto rolos kiel labora kaj ponta lingvo por la loka kaj unu-du lingvoj de UN. En 1995 por la slovaka, angla...

Partoprenkostoj (en *usonaj dolaroj*): Aliĝkotizo $120 ($140 post 1 aprilo). Loĝado, manĝo, ekskursoj: por ĉiu tago, inter $21-$54. (Post 1 aprilo: $27-$60.)

*Petu informojn de:*

D-ro Lev Medvedev, Akademia Novego Myslenia, Pjatnickaja 7,
RUS-113035 Mocsow, Rusio


## NI SERĈAS AŬSTRALIAJN HELPONTOJN POR FORUMO '97

# NIA SOMERLERNEJO 1995






*Aquinas College—La Somerlernejo. Adelajdo.*





## *D-ro Broadribb*

instruas lingvistikon...

kaj aŭkcias. ($300 gajniĝis por la infankongreseto, UK 1997)



## *Oni plantas pacarbon*

(*Odlo:* Ĉu do unu arbo valoras du Redaktorojn?
*Red:* Certe pli ol du Reaktorojn.
*Odlo*: Pacon!)

# 31st CONGRESS OF THE AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION

## Southport, Qld, 30 JUNE 1995-06 JULY 1995

### Congress Information

1. Please bring your informfolio; it contains a map which you will need. Please note that the Akceptejo will now be at building No 21, the Loßejo, not at No 1 as shown on the map. Also, please note that the best way to enter the grounds is along Winchester Street and into Dixon Drive; the entry as marked on the map is now a *no through road.*
2. Some blankets are available. If possible, bring a travel rug. If you have any problems regarding this, contact Ray Ross. You will need to bring your own towel. Bed linen will be supplied.
3. Because it is a boys' boarding school, there are no locks on the doors, so please leave your valuables at home.
4. The arrangement of rooms is as follows—there are 32 single rooms upstairs; 8 single rooms and 36 dormitory beds are downstairs. Dormitory beds are semi-private with half-walls surrounding them.
5. The telephone numbers for incoming calls are—
Upstairs (075) 319 801. Downstairs (075) 319 800.
There are coin phones on both floors for outgoing calls. The phone number of the college administration is in the imformfolio.
6. In the common room upstairs, there is an urn and a refrigerator which you will be able to use. Cups, coffee, tea, sugar, milk and biscuits will be provided.
7. Information regarding buses from airports—
If you fly into Brisbane airport you will be able to catch a Coachtrans bus to Southport. For further information phone (075) 389 944.
If you fly into Coolangatta you will be able to catch buses to Southport. For further information phone Ansett Airport Charter (075) 764 000 or Qantas Gold Coast Transit (075) 366 841.

Your editor regrets that this issue of *Esperanto sub la Suda Kruco* is a few weeks late. He was in hospital for two weeks. The diagnosis was an aprupt onset of diabetes, which apparently is now stabilized with insulin injections.—DB

# INTERVIEW WITH RICHARD SELTEN

## 1994 winner of the Nobel Prize for Economics

*You are at least the fourth Esperantist in history to win the Nobel Prize. It seems that Esperantists receive the Nobel prize fairly often, proportional to the number of Esperantists. Would games theory advise learning Esperanto in order to win a Nobel prize? [Richard Selten is noted for his work in games theory.]*

RS: Learning Esperanto might not help with a Nobel prize, but it does generally develop a person's intellectual life. Learning Esperanto when young gives a great advantage in taking on other languages.

Games theory is a mathematical theory of conflict and cooperation in situations in which you can cooperate or conflict with each other, or both at once. It can hardly make direct recommendations; only provide us with some sort of background knowledge. However, games theory gives better understanding of complicated situations. It also helps understand new similar situations more quickly. And if you have better understanding you can act more effectively.

*In your treatise "Should I learn Esperanto?" (1982) which you published with Jonathan Pool, you gave an encouraging game-theoretical response to the title question, but only in the context of a very limited model, not sufficiently related to reality.*

RS: Pool and I generalized that model of language learning decisions to any language, not just Esperanto, in our English language article "The distribution of foreign language capabilities as games balance" (1991). If we had enough statistics about the speakers of various languages we could go on to perfect our model. It also ought to consider the various degrees of language mastery instead of a simple "yes" or "ne" to knowledge of a language. But there has never been enough time for that development.

Furthermore, games theory models cannot help but be limited because the real situations which we want to understand are so complex that we cannot even dream of analyzing them.

*Have other games theorists occupied themselves with strategies of language learning?*

RS: No, no one but us, although there are innumerable applications of games theory to the most diverse topics. For example, to biological evolution, which has an easily quantifiable factor. Namely, natural selection pushes living beings to conduct which optimizes their reproductive success; by counting the offspring you can measure that success in numbers.

*Language historical factors could similarly be quantified, for example how the changing prestige or usefulness of a language influences its "reproductive success".*

RS: Yes. For example, the sociolinguist William Labov found that sometimes dialects evolve very quickly under the influence of social factors. On Martha's Vineyard, an island off the east coast of the USA, the inhabitants evolved a

special dialect when they wanted to distinguish themselves from the newly arrived wealthy who bought summer houses. Dialects are useful to indicate that someone does or does not belong to some group.

Can you put that factor of belonging into your model? Your model has the premise that people want to communicate with as many others as possible—but in this case it's the wish not to communicate.

RS: Language has not only the function of communicating but also of making social distinctions. This latter function can be useful to the speaker: if you communicate in dialect with fellow dialect speakers, you are close to them, so they are more inclined to help you than persons who do not speak the dialect.

*It seems that games theory has found its best application so far in economics.*

RS: Yes, but also there it is more helpful in improving understanding than in giving direct recommendations. You can recommend if you have yourself elaborated the structure to which the recommendation is to be applied. For example, auctions of radio and television frequencies are now taking place in the USA, with the rules worked out by games theorists—and there the purchasers are also looking for advice from games theorists.

*Is that the way to get rich from games theory?*

No, you won't get rich...That has never been my goal. I want to understand how the economy functions—not to become wealthy but for the understanding itself.

*In another interview you mentioned that your scientific priority is no longer games theory.*

RS: I am still concerned with it, but I am most interested in the field called "limited rationality", which is also important for games theory. Namely, games theory generally supposes that everyone is able to act most rationally in his own interest. But human thought and calculational abilities are in reality very limited. Despite that limitation we must all of us act in an extremely complex world. So the problem is: what theory would make it possible to describe the activity of people with limited capabilities who make decisions in very complex economic situations? For many decades I have believed that a theory about that must be evolved. I began making experiments with that in mind as early as the late 50's.

I can give an example of limited rationality in relation to Esperanto. Everyone knows that it is good to require payment for an Esperanto course, because if a student pays it is more likely that he will finish the course. Actually the fact that he paid ought not to influence his decision to stay, since in any case his money is gone. The value of staying or not staying in the course does not depend in any way on the fact that he has already paid or not.

*Limited rationality certainly has a role in decisions concerning language learning! Umberto Eco in an interview said that if totally rational decisions were made on a national level in regard to language learning, then, for example, in France 2% of the people would have to learn Bulgarian, proportionate to the importance of*

*Bulgarian for the French.*

RS: But you must not leave out of consideration that by using English you would also be able to reach those Bulgarians who speak English. And they are actually the people you would prefer to reach because presumably they have more dollars *[laughs]*! Because English has an international role, very many people choose it as their first foreign language.

*It appears that you yourself have written more in English than in German.*

When I was young I wrote a lot in German too—but today even for a publication in Germany it is preferable to write in English. Otherwise the Germans would think you don't have anything important to say! That certainly cannot please an Esperantist like me, but I think that even that sort of internationality is better than no internationality. I would truly prefer that all scientific works be in Esperanto, but that cannot take place over night.

*Has the internationalization of English already reached the point of no return, critical mass?*

RS: No, and Esperantists certainly have a hope: it seems that learning Esperanto makes subsequent learning of foreign languages easier. Esperanto should succeed even if only for that reason. But to bring this about there needs to be enough people who already know Esperanto...

*...and are able to teach it.*

*To return to the course member in your example: don't the people already in the Esperanto movement act just like him? They think: "I have invested a lot in Esperanto, it would be a pity to leave it even if it does not become a widely used second language."*

RS: My standpoint is that you should not be an Esperantist only to see your goal win out; it is important to support goals which you cannot expect to have an easy victory. If something is morally good it remains morally good even if it does not succeed. That the "final victory" is invisible is not cause to be unfaithful to the ideal.


*Furthermore, the Esperanto community itself has many attractive qualities.*

RS: Absolutely! Unfortunately, the older I become the less easy it is for me to enjoy that attraction, for lack of time. In my youth it was easier for me to be active.

*I must also ask about how you became an Esperantist.*

RS: I started to learn Esperanto at age 17, in 1946-47, I taught myself...My father was an Esperantist and quite active in the Esperanto movement for the blind. But I did not learn the language simply because of his support for it. I learned it quite a long time after his death...

[Translated by Donald Broadribb
from an interview published in
*UEA/Esperanto* December, 1994.]



*Kep Enderby kaj la pacarbo*

(*Odlo:* Ĉu du geamantoj?
(*Red.*: Mi kredas ke jes. Aŭ du gajamantoj.)



*Nia Infan-somerlernejo*
Kerry, Julia, Aaron, Jessica



*Internacia Kunveno*
Bernd—Aŭstralio/Germanio
Viola—Germanio
Anna—Pollando
Trevor—Aŭstralio/Tero Solaris
Tanya—(Germana/Pola/Aŭstria ?)

**(Postkomentoj:**
*Red.:* Sed la foto sur p.15 ne montras infank~~ongreson~~. La infanoj nur kunsidas por bele fotiĝi.
*Odlo:* Mi rajtas renomi ĉiujn fotojn...
*Red.:* Kaj mi kredis ke Terry Manley, la dancestro, sendis por ni tekstraporton pri la Somerlernejo. Kie ĝi estas?
*Odlo:* Nu, mi...forviŝis ĝin.
*Red.:* !! Kiam?
*Odlo:* Kiam mi viŝis vian tutan malmolan diskon. Ĉu vi ne memoras?
*Red.:* Mi multe tro klare memoras! Necesos pardonpeti al Terry.
*Odlo:* Vi pardonpetu. Mi intencas trinki.
*Red.:* Ĉu trinki? Kion?
*Odlo:* Nu presinkon, kompreneble. Tute elĉerpis min desegni tiom da bildoj.)

## AVENTUROJ EN ESPERANTUJO
### recenzas Donald Broadribb

Ĝenerala takso: 

*Aventuroj en Esperantujo* de Ralph Harry. Sidnejo: Libro-Servo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio, 1995. 82p., broŝ. $8.00.

Niaj aŭstralaziaj asocioj estas tre malgrandaj, sed la proporcio da eminentuloj en ili estas granda. Ĉi tiu libro estis verkita de unu el niaj plej eminentaj: D-ro Ralph Harry, emerita ambasadoro, kunplaninto de diversaj UN-dokumentoj, terminaristo, kaj, cetere, briĝludisto eksterordinara.

Historio ne estas nur serio de nomoj kaj datoj, ĝi konsistas el la agoj de individuaj personoj. Kiel pli interese lerni historion aŭ informiĝi pri eventoj ol legi pri ili laŭ la okuloj de la agintoj mem? Legante ĉi tiun libron oni lernas ne nur la historion de Esperanto en Aŭstralio—ne la tutan historion, kompreneble, sed grandan parton!—sed ankaŭ internacie gravajn eventojn, inter kiuj elstaras ja tiuj de UN, kaj ankaŭ de la olimpiaj ludoj, kaj pli.

Ĉio rakontita per interesa stilo. DB

---

## BEING COLLOQUIAL IN ESPERANTO
### recenzas Donald Rogers

Ĝenerala takso: 

*Being Colloquial In Esperanto—A Reference Guide For Americans de* David K. Jordan. Lanham, University Press of America, 1992. ISBN 0-8191-8645-7 (cloth), ISBN 0-8191-8646-5 (pbk)

La aŭtoro direktas ĉi tiun libron al usonanoj kiuj jam finis elementan kurson pri Esperanto, kaj kiuj deziras pli-malpli kompletan referencon pri la gramatiko. La teksto estas en la angla lingvo, kaj la ekzemploj en kaj la esperanta kaj la angla.

La abundaj ekzemploj meritas mencion. La uzita vortostoko estas vasta por tia libro. Pri la elekto de nomoj li ne estis tre inventema, kaj kompatinda "Daĉjeto" estas la viktimo de multaj kritikemaj ekzemploj. Mi divenas ke la gepatroj de la aŭtoro eble nomis lin "Little Davey" kaj multe kritikis lin.

Ĉi tiu libro celas montri kiel oni nuntempe en la praktiko parolas kaj skribas Esperanton kaj respondi la kutimajn demandojn de usonaj lernantoj. La aŭtoro esperas ke lia verko pli taŭgos ol tiu de Butler (*Step by Step in Esperanto*) pro pli bona organizado por referenco, per la provizo de pli da detaloj kaj ekzemploj, kaj ĉar ĝi baziĝas sur la lingvaĵo, kaj esperanta kaj

angla de la malfrua parto de la dudeka jarcento. Mankas indekso.

La libro konsistas el du partoj: unue la gramatika sekcio, kaj due la alfabete ordigita listo kaj diskuto de vortoj kiuj defias speciale anglalingvanojn. Temas plejparte pri "falsaj amikoj" kaj paronimoj[2], sed la aŭtoro ankaŭ inkludis terminojn kiuj ŝajnas interesaj aŭ amuzaj. Lia diskuto de la esprimo "krokodili" estas bona ekzemplo de ĉi tio.

Krom prezenti ekzemplojn de la nuna lingvaĵo, la aŭtoro ankaŭ provas antaŭvidi kiel la lingvo evoluos. Ekz-e li skribis ke verboj kiaj "ruĝi" = "esti ruĝa" verŝajne estos post la jaro 2050 pli oftaj ol la nekombinitaj formoj. Pri tiaj rimarkoj oni povus malkonsenti!

Bedaŭrinde troviĝas kelkaj preseraroj, plejparte malgravaj sed ili damaĝas la aspekton de ĝenerale bona verko. Eraro sur paĝo 91 donas la malan sencon al tiu kiun la aŭtoro supozeble intencis. Tie oni legas pri netransitivaj verboj: "use -ig to make them intransitive". (La lasta vorto devas esti "transitive", ĉar ili jam estas netransitivaj.)

Mi supozas ke legantoj de *ESK* demandos ĉu la verko taŭgas por neusonanoj. Mi opinias ke jes, kondiĉe ke oni povas kompreni la usonismojn. Mi kelkfoje devis serĉi en anglalingva vortaro por klarigi la usonajn (eble regionajn) idiotismojn (ekz-e "putter", "yammer"). Memevidente ĉiuj devas zorgi pri la konsiloj pri la prononcado de Esperanto. Ĉiuj lernolibroj por anglalingvanoj havas tiun problemon, ĉar la prononcado de la angla multe varias. Ekzemple li donas kiel modelojn por la prononcado de la vokalo "o" la anglajn vortojn "cOke, lOne, prOletariat". Laŭ mia prononcado la o-oj en ĉiuj tri vortoj estas diftongoj kaj tial ili tute ne taŭgas.[3]

Unu bona trajto de la verko estas ke ĝi konsilas pri kelkaj oftaj eraroj de alilingvanoj kaj konsilas, ke oni ne ofendiĝu aŭ miskomprenu. Mi povus aldoni ke esperantistoj evitu negativajn demandojn (ekz-e "ĉu vi ne ŝatas tion?"), speciale parolante al japanoj aŭ koreoj. Ilia senco de la respondo estas tute mala al la nia.

La plej stranga aserto en la libro temas pri "ambaŭ" (p 148). Jordan skribis ke ĝi estas teknike adverbo, sed oni uzas ĝin kvazaŭ ĝi modifas substantivon. La kialo por tio estas ke "ambaŭ" estas pronomo kaj adjektivo (*PIV*). Kiel pronomo ĝi aperas sole ("ambaŭ venos") kaj kiel adjektivo ĝi modifas substantivon ("ambaŭ infanoj venos").

Li mencias la diferencon inter "devas ne" kaj "ne devas" (kiun Alan Towsey notis pasante en *ESK* n-ro 12, p 13). Ŝajne ĉi tiun distingon eĉ Zamenhof ne faris; vidu ekz-e dev/i en *PIV*. Logike devas esti diferenco inter la du, sed en iuj aliaj lingvoj (ne la angla) oni sentas ilin ambaŭ kiel "devas ne". Ĉi tiu

---

[2]Vortoj preskaŭ samsonaj, ekz. pezi/pesi.—Red.

[3]Laŭ aŭstraliaj-novzelandaj prononcmanieroj, vi pravas. Sed ne laŭ la usona prononcmaniero.—Red.

fenomeno estas ekzemplo de la pli ĝenerala regulo, ke en Esperanto adverboj inter du verboj rilatas al la dua verbo, ekz-e "li volis ofte veni", en kiu "ofte" rilatas al "veni", do ĝi samas al "li volis veni ofte" sed ne al "li ofte volis veni".

Mi opinias ke ĉi tiu libro utilos al aŭstraliazianoj ĉar ĝi estas facile digestebla, ekzemploj montras ĉiutagajn esprimojn kaj ĝi estas ĝenerale korekta. La aŭtoro skribis (p viii) ke li ne intencis lingvistike krean, kompletan aŭ tute konsekvencan priskribon de la esperanta gramatiko, tamen ni bezonas tian verkon (prefere en Esperanto). Por tiu celo ĉi tiu recenzanto rekomendas la verkon *Gramatiko de Esperanto* de Bak Giŭan, kiu aperis post la libro de Jordan. Tamen la verko de David Jordan estas tre praktika, valora kaj rekomendinda por la celoj por kiuj li ĝin intencis. ❑

## AFORISMOJ KAJ TEKSTOJ
### recenzas Ralph Harry

Ĝenerala takso:

*Aforismoj kaj tekstoj de Constantin Brâncusi.* Kolektitaj de Constantin Zarnescu, esperantigitaj de Ionel Onet. Eldonejo Bero, PO Box 13492, Berkeley CA 94712, Usono.

Ĉi tiu libreto (35 paĝoj) konsistas el enkonduko pri Brâncusi, la rumana skulptisto, pensulo kaj mondcivitano, 254 aforismoj kaj tekstoj, kaj postparolo de la tradukinto.

La enkonduko ne donas ampleksan bildon de la vivo kaj verkoj de Brâncusi, nek de lia kontribuo al la nova skulptado. Naskite kamparano en 1876, komencinte per lignoskulptado, lin interesis Rodin kaj post longa restado en Francio liaj verkaĵoj, ekzemple *La Kiso* forte influis Modigliani kaj aliajn artistojn. Li mortis, ege respektata, en 1957.

La aforismoj estas klasigitaj laŭ la rubrikoj I Pri arto kaj II Pri vivo. Ili estas interesaj pensoj de interesa persono. Ili ne troviĝas en la klasikaj citaĵaroj kiaj John Bartlett *Familiar Quotations* aŭ Buchmann *Geflugelte Worte*, sed *Encyclopaedia Britannica* mencias lian bonan parolon (rilate Rodin) ke "nenio altiĝas en la ombro de grandiozaj arboj"...ke lia verko *The Beginning of the World* ("La Komenco de la Mondo") estis "skulptaĵo por blindulo"... kaj ke "a carving is a confrontation without mercy between the artist and his materials" ("skulptaĵo estas konfrontado senkompata inter la artisto kaj liaj materialoj"). Certe pluraj citaĵoj meritos inkludon en la esperata dua eldono de *Vortoj kun Flugiloj.* La fakto, ke franca traduko estas finpretigita aldonas al la internacieco de la kolekto.

Jen kelkaj specimenoj:

08. En arto ne devas ekzisti fremduloj.
29. La homa korpo belas nur se ĝi spegulas la animon.
64. La Arto ne estas hazardo.
121. Vera skulptaĵo devas havi la econ kuraci tiun kiu rigardas ĝin.

166. Mi kantigis la ŝtonon—por la Homaro.
171. En doloro ekzistas, ĉiam, iom da plezuro.
192. Antaŭ aĉeti domon—aĉeti najbarojn.
250. Mia vivo estas sinksekvo de mirindaĵoj.

Estas espereble, ke la persisto de la tradukinto, tra ĉiuj persekutoj kaj malfacilaĵoj estos rekompencitaj de grandskala aĉeto fare de la Esperantistaro.

## VLADO KOSEF

Vlado mortis la 13an de decembro, 1994, 89-jaraĝa. Li naskiĝis en Bulgario, atingis Aŭstralion en 1945. Metie li estis domfarbisto; kore li estis sincera esperantisto. Li estis ano de AEA, UEA kaj SAT.
Al liaj vidvino kaj kvin infanoj ni sendas nian kondolencon, kaj al ĉiuj kiuj nomis sin "geamikoj de Vlado" en Cobar kaj aliloke.

Laŭ *Telopeo*

## Deziras Korespondi

Adreso de la Korespondservo de AEA: Betty Aulsebrook, 51 Lakeview Crescent, Forster NSW 2428. Se vi deziras korespondi kun persono en la ĉisekva listo, vi povas havigi de nia Korespondservo ties originalan leteron.

/ GYORGYI CSCRBA, F-ino Batthyany: u.18, 6500-Baja, Hungario. Komencanto, interesiĝas pri modo, anglalingva legado, korespondado. 15-jara knabino.

/ KORSÓS TAMAS, Vorosmarty: u.20/6, 6528-Bartmonostor, Hungario. Komencanto, interesiĝas pri aliaj landoj, muziko (Beatles), lingvoj, korespondao. 15-jara knabo.

/ F-INO AINE MCCOY: Box 2831, Escondido CA 92033-2831, Usono. 29-jara. Interesiĝas pri aliaj lingvoj (gaela, kimra, ktp.) artkarikaturado, muziko, aŭstraliaj kulturo, muziko, festoj.

/ MARIO JOSÉ BATISTA: Rua Maria das Dores, 72 Cruz de Rebouças, 53600-000-Igasassupe, Brazilo. 26-jara. Interesiĝas pri poŝtbildkartoj, rokmuziko geesperantistoj.

/ AZHAR JAVED: PO Box 1687, International Islamic University, Islamabad, Pakistano. Studento pri ekonomiko en la Universitato en Islamabado. 25-jara. Deziras korespendi kun homoj ĝis 30-jaraj.

/ JAROSLAV JANIAK, str Lubeckiego 14 m30, POL-91403 Lodz, Pollando. Interesiĝas pri arkeologio, etnologio, religioj, popola kulturo. ❑

# ZAMENHOF-FESTA PAROLADO 1994

## de Martin Purdy

Karaj gesamideanoj,

Jam la duan jaron mi havas la honoron prezenti la Zamenhofan festparoladon. Ĉi-foje mi volas, ke vi pripensu demandon: ĉu ni vere estas samideanoj, kiam temas pri nia sinteno rilate Esperantajn librojn?

Inter Esperantistoj oni ofte aŭdas tiajn deklarojn: "Ni ne bezonas literaturon". "Esperanta literaturo ne interesas min". Sufiĉe multaj jam diris tiaĵojn al mi. Nu, mi ne dubas, ke la Esperanta literaturo povas fortimigi eĉ la plej spertan Esperantiston. Unue, ĝi povas esti tre banala. Samtempe bona kaj malbona afero inter ni estas, ke iu ajn povas esti aŭtoro. Kiel grupo, ni estas sufiĉe malmultnombraj, kaj ni ŝajne estas pli akceptemaj, kiam temas pri tiel nomataj "verkistoj"—Esperantistoj povas eldoni librojn, kiuj ne estus akceptataj en aliaj sociaj medioj pro ilia malalta kvalito, ne nur lingve sed ankaŭ enhave. Tio estas bona afero por la aŭtoroj, sed malbona por la legantoj, ĉu ne? La dua kialo, kiu povas esti ligita kun la unua, depende de via propra vidpunkto, estas la abunda uzado de vere nenecesaj neologismoj ĉe aŭtoroj, kiuj laŭ aliaj kriterioj estas sufiĉe bonaj. Ĉu ili vere verkas en Esperanto?

Permesu, ke mi citu mallongan artikolon, kiu aperis antaŭnelonge en *Eventoj*:

"Iam, en la pratempo, du vortaroj sufiĉis: *Plena Vortaro* kaj unu dulingva. Poste venis tria, kiu povas solvi modernajn problemojn. Tamen nun...! Li montris al mi libron, verkitan de hispano, kaj vere, mi konstatis, ke ĝi enhavas grandparte hispanajn vortojn, en konvenaj momentoj provizitaj per finaĵoj -o kaj -a. Alia libro estis verkita en sammaniere verdigita angla lingvo, kaj la tria klarvideble estis de germana deveno. Kaj nun mi konstatis: la tablo estis kovrita per vortaroj en ĉiuj eŭropaj lingvoj... nur por legi Esperanton.

"Mi esperas, ke Esperanto en Afriko ne sukcesos," li ĝemis. "Nenie mi povas trovi bonan vortaron por la svahila lingvo...."

La artikolo daŭrigas, sed mi ne citos la tuton. Tamen, la aŭtoro estas iagrade prava, ĉu ne? Estas interesa ludo, diveni la naciecon de verkisto dum oni legas ties Esperantajn frazojn.

Nu, mi donis pravigon laŭ du vidpunktoj, kial oni ne legu Esperanto-literaturon. Tamen, ĉu estas eble pravigi la legadon de esperantaj libroj?

Antaŭ jam kelkaj jaroj, mi diris al iu sinjorino en iu urbo—mi ne donas nomojn—ke impresis min la fakto, ke oni sufiĉe ofte prunteprenas Esperanto-librojn el la loka biblioteko. "Jes," ŝi diris, "mi ofte prunteprenas ilin kaj lasas ilin ĉe mi dum du semajnoj, por ke la bibiotekistoj supozu, ke ili estas popularaj kaj ne forĵetu ilin". Nu, ne leginte la librojn ŝi remetis ilin! Kia afero! Ankaŭ al ŝi ne plaĉis la legado.

Mi opinias, ke tiu vidpunkto estas prava. Ni ne ofte renkontas unu la alian. Niaj ĉiumonataj kunvenoj ja estas agrablaj, sed ili ne sufiĉas por igi Esperanton

vere vivanta lingvo inter ni. Kaj por renkonti aliajn Esperantistojn el neanglalingva medio—la Universalaj Kongresoj estas ofte tre foraj kaj tre multekostaj aferoj. Legante librojn aŭ almenaŭ gazetojn eldonatajn en aliaj landoj estas multe pli facila kaj malmultekosta maniero—unue por "vojaĝi en la kapo", kaj due por alfronti Esperantajn tekstojn verkitajn de alinacianoj. Vidi novajn, neanglajn parolturnojn devas influi nian propran lingvouzon kaj gvidi nin al pli internacia uzmaniero. Ni povas mem elekti, kiuj estas la malbonaj formoj—aŭ diskuti kun aliaj, kiuj estas bonaj kaj kiuj nebonaj.

Jen, miaopinie, la ĉefa kialo por legado de nia literaturo. Kaj tial mi volas, ke ni restarigu malnovan kutimon, kiu estas ankoraŭ aktuala en partoj de Eŭropo. Mi citu ties devenon el la *Enciklopedio de Esperanto*:

"Tago de la Libro.": Dum la Universala Kongreso en Danzig, 1927, J Baghy proponis, ke la 15-a de decembro estu ĉiujare la tago de la Esperanto-literaturo, do festo de la libro. La kongreso unuanime aprobis la ideon kaj jam dum tiu jaro la Esperantstoj aranĝis librofestojn en la tuta mondo je tiu dato. De tiam oni konsideras morala devo de ĉiu "vera" Esperantisto, okaze de tiu ĉi tago aĉeti minimume unu Esperanto-libron.

Mi aldonu nur, ke oni ne nur aĉetu, sed ankaŭ legu tiun libron! Se vi ne aĉetis—kaj legis—Esperanto-libron dum la jaro, rigardu en via katalogo morgaŭ, kaj festu ne nur la naskiĝdaton de Zamenhof, sed ankaŭ la Tagon de la Esperanto-Libro. ❑

---

# RAPORTO DE LA LIGO DE OKCIDENTA AŬSTRALIO

En la novembra (1994) jarkunveno nova estraro estis elektita. Maureen McSweeney, kiu estis plurfoje malsana lastatempe, estis anstataŭita kiel vicprezidanto de Shirley Gradussov. Shirley Landquist restas prezidanto, Peggy Martin plu estas sekretario kaj kasisto. La komitato, kies membroj estas Chris Dean, Len Eddington, Owen Loneragan kaj René Smeets, tute ne ŝanĝiĝis.

Je la 15a de decembro, ni festis la naskiĝtagon de D-ro Zamenhof, denove en *University House*. Komence oni trinkis/drinkis iomete antaŭ la bankedo. Shirley Landquist bonvenigis la Esperantistojn kaj la amikojn de Esperanto kaj koncize raportis pri la agado de la Ligo en la pasinta jaro. Ŝi ankaŭ dankis la instruistojn kaj aliajn pro iliaj peno kaj laboro.

Post bona manĝo estis ĉi tiun jaron la vicon de Elvie Rowe doni la Zamenhof-paroladon. La parolado estis tre bone prononcita kaj kuraĝigis la aŭskultantojn daŭrigi la batalon por niaj idealoj. Post tio Shirley Gradussov donis la Esperanto-pinglojn al la ok studantoj kiuj sukcese trapasis la jaran kurson.

Post la oficiala parto de la festo ni interbabilis kaj ankaŭ kantis i.a. *Zamenhof-Festo-Kanton* verkitan de Vera Payne. Tombolo kaj vendado de libroj kompletigis sukcesan feston en kiu 40 personoj partoprenis.

Nun ni jam antaŭĝuas piknikon en King's Park je la 19a de februaro kaj plankunvenon ĉe nia prezidanto ankaŭ en februaro. *René Smeets*

# Malbeno Kara

Verkis: *Mary Webb*
Tradukis: *Grace Kirkwood*
Dialektigis & editoris:
*Donald Broadribb*
Laŭ praskemo de Trevor Steele kaj Niĉjo Nicholas

**Junulino** bela sed kun leporlipo, ĉu sorĉistino?
**Teksisto** juna, bela, forta, el kie veninta?
**Frato** kiu ne hezitas murdi por plenumigi sian celon
**Sorĉisto** kiu mistere profetas neeviteblan katastrofon, kaj volonte helpas ĝian efektiviĝon

Ingrediencoj por romantika romano streĉa.
$30 inkluz. sendkostojn
Mendu de Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304

# POR ĜUSTE UZI ESPERANTON

de Marcel Leereveld

Artikoloj jam eldonitaj kaj novaj pri gravaj problemoj de la Esperanta gramatiko kaj pri la neologisma problemo.

Nia klera esperantologo kaj instruisto parolas rekte al vi.
$25 inkluz. sendkostojn
Mendu de Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304



# SKRIBAS LA LEGANTOJ



**De Judita Schiller:**

Per kelkaj frazoj mi emas aliĝi al tiuj kiuj en la lastaj monatoj al *ESK* kontribuis per filmaj alparoloj.

Temas ĉe mi unuavice pri la vidbendo *Kinarto kaj ni.* Mi konsentas kun Rik Dalton: jes, ĝi estas "forte rekomendinda" al ĉiuj kinoŝatantoj de Esperantio ĉar, kiel antologio, ĝi povas esti kaj interesa amuzo, kaj valora elirpunkto porĉiuj pluaj esploroj de la temo.

Sekve, ĝi meritas ankaŭ tion ke la indikoj pri ĝi estu precizaj:

La vidbendo *Kinarto kaj ni,* Antologio pri esperanto en kino, haveblas ĉe la produktinto surmerkatiginto kaj havanto de ĉiuspecaj rajtoj: Kooperativo de Literatura Foiro, CP 232, CH-6840 Chiasso 1, Svislando, mendeblas ĉe la sama adreso por CHF 45. = proks. AŬ$40—.

Havante la bonan okazon, mi mencias ke ĉe LF-Koop aĉeteblas ankaŭ tri pliaj vidbendoj:

*Angoroj* de J.L. Mahé, la unua originala fikcia filmo en esperanto, CHF 45.—= proks. AŬ$40.

*Babel'* de Y. Davis, kolora "negativa utopio" en esperanto. Prezo: CHF 45.—=proks. AŬ$40.

*Kiam Parizo estis Parizo ankaŭ por ni esperantistoj,* kolora muzika vidbendo en esperanto, de belga kantistino Nikolin'. Prezo: Prezo: CHF 100—= proks. AŬ$90.

**De Donald Broadribb:**

Mi deziras atentigi ke iom da misinformo disiradas pri la uzado de Esperanto en la televidfilmserio *Red Dwarf.* Efektive, la lingvo Esperanto estas menciita nur unufoje, en epizodo 2 "Kryten". La sceno daŭras 1 min. 27 sekundojn, kaj konsistas el kvin frazoj lernataj de la hologramo Arnold Rimmer. Krome, en la epizodo "Stasis Leak" la lifto havas surskribon "XPRESS LIFT / KSPRESA LIFTO". Kelkaj aliaj murskriboj esperantlingvaj troviĝis en postaj epizodoj sed ili rapide malaperis. Trifoje en la 26+ epizodoj de *Red Dwarf* spacŝipo estas nomita Esperanto.

## RADIO 3ZZZ

Jennifer Bishop informis nin ke la Esperanto-programo de Radio 3ZZZ (Melburno) kaj la satelita relajso ekde la 9a de januaro daŭras unu horon. Ĝi komenciĝas je la 1a ptm kaj finiĝas je la 2a ptm regule ĉiulunde. Bonvolu persvadi vian regionan similspecan radiostacion disaŭdigi la programon per la satelita relajso.



# DIVERSAĴOJ



## ANZEK 2

La Dua komuna **A**ŭstralia **N**ov-**Z**elanda **E**speranto **K**ongreso (Anzek 2) okazos de merkredo la 3-a de januaro 1996 ĝis mardo la 9-a de januaro en la Nov-Zelanda metropolo Aŭklando, laŭ konsento inter la LKK kaj Max Wearing kiu aranĝos la Somerlernejon en Adelajdo. La aviadilo flugos rekte de Aŭklando al Adelajdo merkrede la 10-an de januaro 1996, por transiro al la Somerlernejo.

La Unua komuna kongreso de AEA kaj NZEA okazis en Sidnejo en januaro 1992, en kiu cent esperantistoj partoprenis. Antaŭ unu jaro la estraroj de AEA kaj NZEA decidis ke dua komuna kongreso okazos en 1996, ĉi foje en Nov-Zelando. La LKK jam preparas programon por sendo al AEA por ĝiaj opinio kaj ideoj, kaj aranĝas interesajn ekskursojn.

Dum la lasta kongreso de NZEA en Aŭklando oni tuttage ekskursis el la haveno al unu el la multaj insuloj en Golfo Haŭraki. Tiu ideo venis pro la ĝuiga ekskurso, dum la Sidneja komuna kongreso, sur Rivero Nepean, kiu ĉiujn ravis. La Aŭklanda ekskurso al Insulo Rakino ankaŭ allogis multajn feliĉajn ekskursantojn. Informis Brian Fox

---

### NI GRATULAS

al S-ino Jeannie Wilson, Nov-Zelanda membro, kiu la 20an de marto festis sian 100jaran naskiĝtagon. Ni esperas plu informi pri ŝi en nia maja numero.

## POR LA UK EN ADELAJDO 1997

**Aŭstralia Poŝto:** estas nepre dezirinde ke Aŭstralia Poŝto eldonu esperantan poŝtmarkon kaj esperanto-stampon okaze de nia UK okazonta en 1997. Ni petas ĉiujn membrojn kaj amikojn skribi al

Mimi Colligan
*for* The Manager, Philatelic Group
Autralia Post
GPO Box 1777Q
MELBOURNE VIC 3001

# KOMPUTIL-UZANTOJ

Esperantaj alfabetoj por Macintosh kaj por Windows haveblas de la redakcio de *Esperanto sub la Suda Kruco.* Por aro da alfabetoj bonvolu sendi unu HD-diskon (por Windows) aŭ 2 HD diskojn (por Macintosh). Nepre informu ĉu vi deziras la alfabetojn por Windows aŭ por Macintosh. Ankaŭ kunsendu taŭgan afrankitan adresitan koverton por la resendo de viaj alfabetoj. (Ni rekomendas uzi la Photo & Disk Mailers vendatajn de Aŭstralia Poŝto.) La alfabetoj mem estas senpagaj.

---

# LA ESPERANTO-KLUBO DE MANLY

informas ke dum la jarkunveno de la 29a de januaro 1995 elektiĝis:
*Patrono:* Ralph Harry
*Prezidanto:* Robby Robertson
*Vicprezidantoj:* Eunice Graham kaj Anthony Gaskell
*Sekretario:* Betty Cleminson
*Kasisto:* Margaret Robertson
*Libroagentoj:* Irina Timonin kaj Janet McCelland

---



Tre sukcesa Esperanto-stando en la Azi-Pacifik-Aŭstralia Skolta Ĵamboreo Perto, januaro 1995. Multaj skoltoj interesiĝis pri Esperanto kaj prenis informfoliojn pri la lingvo kaj ĝiaj celoj.

# ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

estas komuna eldonaĵo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio.

La Aŭstralia Esperanto-Asocio:
Prezidanto: Kep Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.
Vic-Prezidantoj:
Vera Payne, 36 Donegal Road, Floreat Park WA 6014.
Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney SA 5069.
Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank Qld 4109.
Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, Bentley WA 6102.

Membrokotizoj: AŬ$30 por individuo, klubo, kc, (+$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso); $20 (minimume) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto. Ĉiujn nomo- aŭ adreso-ŝanĝojn nepre sendu al la redaktoro: D-ro Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304, Aŭstralio. ☎ 096 46 1389. Elektronika poŝto: don@enkidu.dialix.oz.au

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:
Prezidanto: Brian Fox, 634 South Titirangi Rd., Auckland 1007. ☎9-817 8244.
Sekretario: David Rockell, 5-71 Princes St, Otahuhu, Auckland 1006. ☎ 9-270 3669.
Kasisto: Jackie Fox, PO Box 41-172, St Lukes, Auckland 1003.

Membrokotizoj: NZ$30 por individuo; $40 por geedza paro; $10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Kluboj po $1 por ĉiu ano, maksimume $15.
Ekster Aŭstralazio abono al *Esperanto sub la Suda Kruco* kostas 55 ned. gld., kio inkludas aerpoŝtan sendadon. Oni povas mendi la gazeton:
Per pago de 55gld en la konton ĉe UEA de la Libroservo de AEA, konto aeal-w, kun samtempa informo al la Libroservo de AEA, aŭ
Per mendo rekte al la Libroservo de AEA, pagante per 37 IRK (aĉetitaj post februaro 1992), aŭ per bankĉeko en Aŭstraliaj dolaroj AŬ$44. Sendu al la Libroservo de AEA, aŭ
En Usono kaj Kanado abono kostas US$28 kaj mendeblas ĉe ELNA.
Bonvolu informi la redaktoron: D-ro Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304, Aŭstralio, se via nomo aŭ adreso estas neĝuste presita sur la adresslipeto. Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro.
Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas © 1995 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas © 1995 de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de *ESK* estis perkomputile kompostita de Donald Broadribb, per Macintosh LC III kun Sistemo 7.5, uzante Nisus 4.0; kaj Apple OneScanner kun Ofoto 2.0. Alfabetoj uzitaj estas IF New Century Schoolbook 10pkt (Altsys Corp.), kaj Orion Esperanto 16pkt (disponigita de *Eventoj*).
Wholly printed in Australia. Typeset by Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304. Printed by Snap Printing, 921 Albany Highway, Victoria Park East WA 6101.